
Turangulo 30 Luko

2-a trimestro 2013



En tiu numero vi legos..

Dominique Baron raportas pri la pundo Tournois.	p.1
Jane Pinon bedaŭras la malaperon de la vitejaj tulipoj.	p.2
Bérengère Turbillon enketis pri la vivo de la fama presisto Christophe Plantin naskiĝinta en Saint Avertin.	p.3
Tra la leteroj de Emile Bézier, Jacques Gaumé kolektis la frazojn, kiuj temas pri germanaj historiaj eventoj.	p. 3 kaj p.4
Famuloj estas entombigitaj en nia departemento, Dominique Baron listigis ilin.	p. 4 p. 5 kaj p. 6
Nia amiko André Aude forlasis nin... Omaĝo de Jeannine Layseman... kaj anekdotoj de André Aude.	p. 6 p. 7 kaj p. 8

La pundo Tournois (Livre Tournois)

La pundo Tournois estis monunuo uzata en Francujo de la jaro 1203 ĝis la jaro 1795. Ĝi valoris 240 denarojn aŭ 20 soldojn. Antaŭe ekzistis la pundo Parisis. La pundo Tournois aperis sub la reĝado de Philippe Auguste en la 13a jarcento. De la 10a jarcento, la abatejo Sankta Marteno en Tours posedis la rajton fari sian propran monon kaj tie-ĉi unue Philippe Auguste decidis fabriki tiun monon. La ateljero troviĝis en la kvartalo Châteauneuf.

En 1389, sub la reĝado de Charles VI, por lukti kontraŭ la falsaj moneroj, ĉiu ateljero enmetis 'sekretan punkton' lokitan sub la sama litero de la surskribaĵo. Por Tours, ĝi estas lokita sub la sesa litero de 'TVRONVS CIVIS'.

Sub la reĝado de Louis XII aperis la unuaj reĝaj bustoj sur la moneroj. En Tours oni faris la bustojn de la reĝo François I. La antikva hotelo de la Monoj en Tours (apud la baziliko) fermiĝis en 1772. Tiun, kiun oni povas ankoraŭ vidi strato de la Monnaie, oni konstruis komence de la 18a jarcento okaze de la mekanikado de la monfabrikado.

En 1795, la franko anstataŭis la pundon Tournois.

Dominique Baron



Hotelo de la Monnaie



Pensado de unu "Vouvrillonne"
(loĝantino de VOUVRAY) [vuvre]

Sovaĝaj tulipoj estas maloftaĵo de nia flaŭro.

Ĉu ili estas vere spontaneaj ? estas malfacile aserti tion. Ilia patrujo estas Mediteraneo kaj la Proksima Oriento. Kelkaj specoj estis enkondukitaj de Centreŭropo dum Mezepoko kaj ekde tiam perfekte naturigitaj.

Kiam Marto alvenas, naturo revegetas, multe da printempaj floroj ornamas vojrandojn : primoloj, neĝboruloj kaj, en kelkaj grundoj, brilas flavaj sovaĝaj tulipoj apud heĝoj kaj vitejoj.

Ĉiujare antaŭ Pasko, la avidaj dimanĉaj plukuloj plukas brakplenojn da tulipoj, kiuj velkas rapide. Flavaj tapiŝoj malaperas en kelkaj horoj.

Krom tiuj plukaj razioj, neeviteblaj plugadoj kaj diversaj herbicidoj uzitaj en tro altaj dozoj malaperigas tiujn neofendemajn florojn jaron post jaro.

Nun oni povas ankoraŭ vidi kelkajn tulipojn kiel flavajn stelojn inter vinbertrunkoj ankoraŭ sen folioj en vitejoj taŭge kultivataj.

Nun vitejaj tulipoj estas protektitaj per leĝo de Julio 1976 - decidoj de Marto kaj Decembro 1982. En Francio, vitejaj tulipoj estis ĉiam maloftaj plantoj, ili kreskas en rimarkindaj pejzaĝoj.

En nia regiono, oni povis vidi ilin en ‹fortaj*› grundoj de Fondettes, St Cyr, St Symphorien, Ste Radegonde, Joué kaj Ballan. Tulipoj hodiaŭ malaperis meze de plansetlejoj ! (*fortaj = argilaj)

Aliaj sovaĝaj plantoj antaŭlonge abundis, ekzemple ‹Pulsatilles›, Orkideoj, Fritilarioj.

Ekde modifoj de grundo por ĝin plugi kaj planti koniferojn, aŭ kadre de grandegaj laboroj : tracei vojojn, purigi marĉetojn, lagetojn... pli ol 500 plantoj en Indre et Loire el proksimume 1500 malaperis de 10 jaroj.

Ho ! tulipojn de mia infaneco, mi provas trovi... sed tiel malmulte !!!

Etimologio: la nomo tulipo TÜLBEND en turko = planto turbano

Simbolo : tulipoj ĉeestas en ‹Mil kaj unu noktoj › kiel simbolo de AMO...

La ruĝa tulipo signifas eternan amon

La bunta : admiron

La flava : amon sen espero

La tulipo estas prezentata sur irana flago.

La nomo ‹ tulipa revolucio › stampas Kirgizion en 2005 !

Mi uzas kelkajn seriozajn informojn el la « Bulletin de la SEPANT* » n° 28 de Junio 1984 artikolo de Botte François.

*Société d'Etude, de Protection et d'Aménagement de la Nature en Touraine. (Asocio por studi, protekti kaj mastrumi naturon en Turlando.)

Jane Pinon



Christophe Plantin

Fama presisto (1514 - 1589)



Li naskiĝis en Saint Avertin. Li enloĝadis en Caen ĉirkaŭ 1540. Tie li lernis la presistan kaj bindan profesion ĉe la bindisto Robert Macé. En Caen, li edziĝis al Jeanne (de la) Rivière en 1545 aŭ 1546. Post du jaroj en Parizo, Plantin instaliĝis en Anvers kiel ledisto : bindado, fabriko de kestetoj, kasetoj, ingoj. Pro ŝultrorompiĝo en 1555, li devas ŝanĝi la metion kaj malfermas presistan atelieron kiu rapide prosperas. 16 ĝis 22 presiloj funkcias en la apogea tempo, eĉ pluraj filioj prosperis (Leyde). Plantin jam fariĝis fama pro la eleganta korekto de la laboro.

De pluraj jaroj, Plantin rilatis kun la heterodoksa sekto de Henri Niclaes (la karitata familio) kaj estis akuzita, en 1562, pro presado de hereza libreto, kaj devas forlasi Anvers dum pluraj monatoj.

Post la "Hispana Furio" (1576) Anvers viciĝas kun la ribeluloj, kio bremsas siajn aferojn.

Vokita en Leyde de Juste Lipse, en 1589, li ne alkutimiĝis la urbon kaj du jarojn poste revenas en Anvers, kie li mortas. Li estas entombigita en la katedralo Notre-Dame.

Lia produkto estas pli ol 1500 eldonaĵoj. La plej fama estas "Unu Biblio plurlingva" en 8 volumoj, mendita de la hispana reĝo Philippe II kaj realigita sub la direktado de la humanista hispano Aria Montanus. Ni notu ankaŭ la atlason de Ortelius, la botanikajn verkojn de Dodoens, muzikajn partiturojn, la priskribon de Nederlando far Guicciardini, la traktaĵojn de Lipse, liturgiajn librojn, k.t.p.

Lia domo estis sub la ŝildo "Ora Cirkelo", kiu estis ankaŭ sur la librojn kun la moto "Labore et Constantia" (Laboro kaj Konstanteco).



Bérengère Turbillon

Sekvo de la leteroj de Emile Bézier

Historiaj eventoj en Germanio : 1931 - 1932

Mi estas tre konsternata … via amikino estas maldungita, tio estas tre enua por vi, precipe ke vi estas sen laboro kaj mi opinias ke la monhelpo de la germana ŝtato ne estas sufiĉa por dece vivi. (Walter, 18-1-31)

Via lasta letero ricevita depost jam kelkaj tagoj feliĉigis multe min, ĉar ĝi sciigis al mi, ke vi denove laboras, kaj mi opinias vi ankaŭ devas esti feliĉa, ĉar tiel, vi certe havos pli da mono ol per la ŝtata asekuro. (W, 17-5-31)

Nun mi devas diri al vi, ke mi aĉetis fotoaparaton fabrikatan en Germanio : en Dresden ĉe Zeiss-Ikon ; sendube vi konas ĉi tian firmaon, ĉar ĝi estas tre konata kaj bonreputacia tra la mondo.

Eble estas ĉe Zeiss ke vi laboras ?(Linda, 15-6-31)

Do, laŭ via letero, vi estas ankoraŭ senlabora, kiom tio estas bedaŭrinda. (W, 6-10-31)

Via feliĉo estus tute kompleta, se vi havus laboron, sed bedaŭre, la internaciaj aferoj ne lasas antaŭvidi pli bonan situacion por la laboristoj. (W, 31-10-31)

Mi legis en ĵurnalo ke la riverego Elbe elfluiĝis kaj surakvigis multajn urbojn kaj vila-

ĝojn ; ke en Germanio la plimulto el la riveregoj tiel faris kaj multe difektis diversajn provincojn. Ĉu en Dresdeno multe da damaĝoj okazis ? (W, 18-1-32)

Kaj vi kara Walter, ĉu vi ĉiam estas senlabora ? Ĉu vi ĉiam ricevas la ŝtatsubvencion ? Kiam do vi havos daŭran laboron ? (W, 1-2-32)

De kiam mi skribis al vi gravaj okazintaĵoj okazis, inter ili la elekto de la prezidento de la germana respubliko. Kun feliĉo mi konstatas, ke malgraŭ la mizerego en kiu estas la germana popolo ĝi ne volas Hitler kiel prezidenton, kaj mi esperas ke hodiaŭ Hitler estas tute venkata. Ne volante Hitler la germana popolo pravas, ĉar kun Hitler, certe estus la milito post nelonge, kaj ankaŭ estus la morto de la laborista movado, ĉar la industriestroj de li subtenataj klopodus, prenus por malpermesi kaj neigi la sindikatojn kaj aliajn laboristajn organizaĵojn.(L, 10-4-32)

De post la sendo de mia lasta letero, gravaj okazintaĵoj okazis. Mi aludas pri la elekto de la germana prezidento. En Francio oni ĝojis multe ke Hitler ne estis elektata, ĉar oni opiniis ke se li estus elektita la milito, post nelonge, estus certaĵo, sed feliĉe la Germanoj tion komprenis. Ankaŭ ili komprenis, ke Hitler kiel prezidento, tio estus la fino de la laborista movado, ĉar kompreneble li estus subtenanta la kapitalistojn kaj la industriestrojn, kiuj al li donas monon por plifortigi lian movadon.

Hodiaŭ mi legis en mia ĵurnalo la rezultojn pri la germanaj elektoj, kaj laŭ mia ĵurnalo sendube Braun kaj Severing daŭrigos la regadon. (W, 26-4-32)

Ne estas ke mi timis, ke vi ne plu emis korespondadi kun mi, ne, tion mi ne kredis, sed mi scias ke du gravaj okazintaĵoj okazis en Germanio, kaj militanta laboristo, kiu partoprenas la vivon de multaj laboristorganizoj, ne havas tro da tempo por efike lukti kontraŭ la faŝismo.


Sed laŭ la lastaj forpasintaj semajnoj, ni povas konstati, ke la Hitleranaro ne plu kreskas eĉ oni povas diri, ĝi atingis eĉ preterpasis ĝian plej grandan potencon, kaj nun estas videble ke iom post iom ĝi malkreskos, sed ĝia malkresko oni devas precipe al la organizata laboristaro, interalie la Fera Fronto, kies mi havas insignon senditan de mia kamaradino Linda. (W, 11-9-32)

Mi legis en mia ĵurnalo, ke en Dresden, novan politikan partion oni kreis, ĝia nomo estas : Socialista Laborista Partio Germana. La redaktorestro de ĝia ĵurnalo estas Sinjoro Arno Franke, el Dresdeno. Ĉu vi kredas ke ĝi kreskos ? (W, 11-9-32)

Mi legis en mia ĵurnalo ke la 6a de venonta novembro okazos en Germanio elektoj por elekti deputatojn, laŭ mia laborista gazetaro certe la Hitlera partio perdas voĉojn, sed ke malgraŭ tio, la nova parlamento ne povas havi iu ajn plimulton parlementan ĉar la diferencaj partioj kontraŭiĝos unuj la aliajn. (L, 24-10-32)

Jacques Gaumé

La famaj tomboj en Turanĝio



Leonardo da Vinci travivis siajn lastajn jarojn en la kastelo de Clos-Lucé en Amboise. En 1519, oni enterigis lin en la kapelo Sankta Hubert en la najbara kastelo de Amboise. Tie-ĉi restadis la reĝo Francisko la Unua, lia mecenato kaj patrono. La skulptisto Francis La Monaca refaris la tombon de 1934 ĝis 1936. En la jaro 2004, oni dekoraciis la tombon.



Pierre de Ronsard, naskiĝinta en 1524 en Couture-sur-Loir apud Vendôme, estis enterigita en la priorejo de Sankta Cosmes en La Riche en 1585. La franca poeto vivis tie estiel prioro siajn lastajn dudek jarojn. Parte detruita dum la Dua Mondmilito, la Ĝe-

nerala Konsilio restaŭris la priorejon en 1951.

La aktoro **Jacques Villeret**, naskiĝnome Mohammed Boufroura, mortinta en 2005, ripozas en la tombejo de Perrusson. Li naskiĝis en 1951 en Loches de franca patrino Annette Bonin el Tours kaj kabila patro Ahmed Boufroura el Alĝerio. Villeret estis la nomo de lia adopta patro.



La cindroj de **Yul Brynner**, usona komediisto, estas en la privata tombejo de la monaĥejo Sankta Michel de Bois-Aubry en Luzé, apud Sainte Maure.



La aktoro **Albert Dieudonné**, kiu ludis en la unuaj francaj filmoj, troviĝas en la tombejo de Courçay. En 1927, li estis la ĉefa aktoro de *Napoléon,* filmo de Abel Gance. Tiom markita de tiu rolo, li pli kaj pli rigardis sin kiel la imperiestron. Tial, en 1976, laŭ siaj lastaj voloj, oni enterigis lin portanta sian kostumon de Napoleono.



En Vouvray kuŝas la muzikisto **Charles Bordes**. Li naskiĝis tie en 1863 kaj mortis en Toulon en 1909. La 19an de Oktobro kaj 11an de Novembro 2012 okazis por la 4a jaro *la tagoj de Charles Bordes* en la priorejo de Sankta Cosmes. La temo estis : la melodioj de Charles Bordes kun la poezioj de Verlaine. Krome, ekzistas en Tours "la asocio Charles Bordes".



Ankaŭ en Vouvray, oni metis en la tombon **Emile Delahaye** en 1905. Li estis inĝeniero kaj pioniro de la aŭtomobilo. Li inventis la unuan aŭtomobilon tute francan en 1894. 75 laboristoj laboris en lia uzino lokita 34, strato "du Gazomètre" en Tours, nun strato Delpérier. Nun la loko apartenas al la Instituto Notre-Dame-La-Riche. Li venis en la mondon en Tours en 1843.



En la tombejo 'La Salle' en Tours, troviĝas kelkaj famuloj :

- **Victor Laloux**, arkitekto, naskiĝis en Tours en 1850 kaj forpasis en Parizo en 1937. Li konstruis la urbodomojn de Roubaix kaj Tours, la bazilikon Sankta Martin en Tours, la stacidomojn de Tours kaj Orsay en Parizo, la sidejon de 'Crédit Lyonnais' en Parizo, la usonan ambasadejon en Parizo… ;


Urbodomo de Tours

- Louis **Jules Trochu** naskiĝis en Bretonio en 1815 kaj mortis en Tours en 1896. Li estis guberniestro de Parizo en 1870 kaj registara prezidento de la Nacia Defendo. Victor Hugo skribis pri li : « *Trochu, pasinta participo de Trop Choir* » ;



- la skuptisto **François Sicard** naskiĝis en Tours en 1862 kaj mortis en Parizo en 1934. Inter aliaj aferoj li skulptis 'La Baigneuse' kaj 'Les Atlantes' en la urbodomo de Tours, Honorat de Bueil de Racan en la ĝardeno de 'Prébendes' en Tours, la fontanon Archibald en Sydney (Aŭstralio), Alfred de Vigny en Loches, la 'respublikan altaron' en La Panteono de Parizo… ;



- fine, la kanzonisto kaj poeto **Charles Gilles** (1820-1856).

En Saint Cyr-sur-loire, oni povas rekoni la tombon de **Pierre Fidèle Bretonneau**. Li naskiĝis en Saint Georges-sur-Cher en 1778 kaj mortis en Parizo en 1862. Ĉef-kuracisto en Tours, li ankaŭ estis urbestro de Chenonceaux. Li fondis la fakultaton pri medici-



no de Tours. Li identigis la tifoidan febron kaj la difterion. La unua li pensis, ke la mikroboj kaŭzas la malsanojn. Velpeau kaj Trousseau estis liaj disĉiploj. Ankaŭ en la sama tombejo, **Alfred Tonnellé** ripozas. Li forpasis en 1858 en Tours, 26jara pro la tifoida febro, kiu kaptis lin revenante de la Pireneoj. Efektive, tagon post tago li priskribis siajn vojaĝojn precipe en tiu montaro. Li tradukis la verkojn de Humboldt.

La familianoj **Debré** havas siajn tombojn en Turanĝio. **Robert**, patro de la franca moderna pediatrio, mortis en 1978 kaj troviĝas en Vernou-sur-Brenne. Li naskiĝis en 1882. Li kreis la 'Centroj Hospitalaj Universitataj' (C.H.U.).



Lia filo **Olivier** naskiĝis en 1920 en Parizo kaj mortis en 1999 en la sama urbo. Li estis abstrakta pentristo. Lia tombo kuŝas en Nazelles-Négron.

La alia filo **Michel**, naskiĝinta en 1912 en Parizo kaj mortinta en 1996 en Montlouis-sur-Loire, estis politika eminentulo. Oni enterigis lin en Amboise, urbo, kies urbestro li estis de 1966 ĝis 1989.



En Vernou-sur Brenne ripozas ankaŭ **Roger Lecotté** forpasinta en 1991. Li kreis en Tours la muzeon de la metikompanistoj en 1968 kaj de la vinoj en 1975. Li naskiĝis en Vernou en 1889.

Fine, en Yzeures-sur-Creuse, vi povas vidi la



muzeon kaj la tombon de **Mado Robin**, franca sopranulino. Ŝi naskiĝis tie en 1918 kaj mortis en Parizo en 1960. Ŝi famiĝis en la tuta mondo, ĉar ŝi sukcesis fari 'contre-contre D', la plej akuta, alta noto neniam farita.

Dominique Baron

André Aude



Zamenhofa festo, 9an de Decembro 2012, kun Bérengère Turbillon kaj Pierrette Monselet

Nia amiko André Aude mortis merkredon, la 10an de Aprilo hejme. (ne mardon la 9an kiel erare indikita sur la Cirkulero 85)

La civila funebra ceremonio okazis merkredon la 17an de Aprilo : Pluraj membroj adiaŭis lin antaŭ la enĉerkigon en la funebra domo.

32 personoj el kiuj 20 membroj de la esperantistaj grupoj de Tours kaj Chambray ĉeestis en la tombejo de Saint Avertin. Unue ni aŭskultis muzikon de viena valso ŝatata de André. Poste Jeannine Layseman legis la omaĝon, kiun ŝi preparis :

ANDRÉ

Ni estas kune ĉi-tie por akompani André, nia amiko, kiu ĵus finis sian vojon surtere post pli malfacilaj monatoj, suferoj pro dependeco.

Ununura infano, André vivis sian junecon en Orléans, kie li naskiĝis.

La STO (servo de devigata laboro dum la dua mondmilito en Francio) sendis lin al Germanio. En tiu situacio, li provis lerni la germanan lingvon por pli facile komuniki.

La profesia laboro de André, ĉe la SNCF (fervojisto) multe helpis lin por vojaĝi tra Eŭropo. Li ne hezitis ankaŭ iri en Parizo, serĉi fremdajn esperantistajn amikojn ĉe la flughaveno aŭ ĉe la fervoja stacio, aŭ konduki ilin en la ĉefurbon kaj vizitigi ĝin.

Estas en la esperantista medio, en Grésillon,

ke André konatiĝis kun sia edzino Marguerite. Ili geedziĝis en 1956.

Poste, hejme, André kaj Marguerite parolis nur esperante.

Esperanto iĝis ilia pasio. Dum ilia tuta vivo, ili provis konigi tiun lingvon. En la lastaj semajnoj de sia vivo, André, ankoraŭ konvinkis personojn, kiujn venis helpi lin en sia domo. Fakte, André ofte parolis esperante ĉe la telefono, la personoj ĉeestantaj petis de li : kiun lingvon vi parolas ? Tio estis malferma pordo al klarigoj.

Ekde 1953, ĉiun matenan dimanĉon, André instruis esperanton en Saint-Pierre-des-Corps. La junuloj, al kiuj li lernigis esperantiston, ricevis en 1955, indajn komplimentojn por siaj kantoj kaj koruso en esperanto.

André montris sin vere agema en la grupo de Saint-Pierre-des-Corps fondita je 1956. Poste, en la grupo de Tours, kie Marguerite estis prezidantino kaj li mem vicprezidanto. Ekde 1967, André estis delegito por propagando en tiu grupo.

Ambaŭ, ili aktive partoprenis en la organizado de la nacia kongreso en Tours en 1975.

En 1978, ili obtenis, ke publika ĝardeno, en Saint-Avertin, nomiĝu « Ĝardeno Zamenhof».

Kun Marguerite, ili daŭrigas instruadon de esperanto en diversaj lokoj : en la fervojista domo en Saint-Pierre-des-Corps, en la grupo de Tours kaj en la Asocio : « Ĝojo, kulturo, sano ».

Ili ŝatis partopreni en diversaj landaj kaj internaciaj kongresoj. Tiamaniere, ili rilatis kun esperantistoj kaj amikiĝis. Ili vizitis multajn alilandajn esperantistojn : germanoj, angloj, bulgaroj, danoj, italoj, poloj, ĉeĥoj, rusoj ktp. Ili ankaŭ gastigis ilin hejme. André bedaŭris, ke multaj bonegaj amikoj forpasis.

Post la forpaso de sia edzino, André ankoraŭ partoprenis en diversaj kongresoj, vizitis kaj gastigis eksterlandajn geamikojn kaj li restis agema en la grupo de Tours. André ŝatis rakonti anekdotojn pri siaj kongresoj. Ekzemple, li ĝoje parolis pri sia bicikla promenado en Pékino.

André ankaŭ interesiĝis pri aliaj fakoj. Li adoris muzikon, la esperantajn kantojn, ĉefe li ŝategis la vienajn dancojn, kiujn li spektis, kiam li povis, en la « Centro Vinci » en Tours, aŭ li aŭskultis koncertojn televide.

Li informiĝis pri la nuna mondo ; ĉiun vesperon, li ŝatis aŭskulti televide la debatojn pri la socia vivo, inter alie, pere de la elsendo : « C'est dans l'air »

André ŝategis ankaŭ naturon. Kiam ni kune promenis aŭte, ĉiam li miris.

Plaĉis al li ankaŭ aviado, ĉefe la etaj aviadiloj de sinjoro René Fournier el Dierre (urbeto proksime de Tours), kiujn li ŝatus piloti. Cetere dum vizito de luaraj kasteloj aviadile, la piloto lasis al li la stirilojn kaj tiamaniere ravis lin.

Posedante imponan memoron kaj komprenemon, li memoris la historiajn faktojn, la urbajn historiojn.

André ankaŭ ŝatis hundojn. Por fari servon al amiko, li konsentis adopti hundon « Gribouille », dum la lastaj jaroj de sia vivo. Tiu estis bona akompananto kaj iĝis amiko por André. Gribouille reiris ĉe Isabelle, amikino de André, kiu jam okupiĝis pri ĝi dum la enhospitaligoj de André.

André, dank'al via dinamismo, via amikeco, via kutimo ĉiam paroli esperante, vi tre progresigis nin kaj renkontigis nin kun multaj esperantistaj alilandanoj.

Ni dankas vin por ĉio, vi ĉiam restos en nia koro kaj ni neniam forgesos vin.

Jeannine Layseman

Jen anekdotoj, kiujn André skribis por la Turanĝia Luko

Ofte hazardo ŝanĝas la vivon...

Dum la jaroj kvindekaj mi ofte iris al Grésillon dimanĉe dum la somero, ĉefe por kontakti alilandajn gesamideanojn. Mi tie konatiĝis kun pluraj francoj, inter ili kun Marguerite Poiron de Cholet, sed, kiel kun la aliaj francoj, salutis ŝin kaj babilis pri bagatelaĵoj, kaj nenion pli.

Iam, dum la jaro 1954a, au 1955a, okazis en Angers renkonto de SAT-Amikaro. Kvankam ne SAT-ano, mi iris por aŭdi kaj praktiki Esperanton, ĉar mi sciis ke en la renkontoj de tiu asocio la ĉeestantoj nepre uzas Esperanton. Kun ili krokodilado ne ekzistis. En tiu tempo sur la fervojo de Tours al Nantes, la trajnoj estis remorkitaj de vaporlokomotivoj. Laŭ la horaro mi devis alveni en Angers unu horon antaŭ la renkonto, do sufiĉe frue laŭ la grandeco de la urbo. Sed, survoje la lokomotivo paneis. Longe la mekanikistoj baraktis, frapis, ŝajne la difekto venis de bielo. Finfine post du horoj ni foriris.

Kiam mi alvenis en la kunvenejo, la prelegoj jam komenciĝis. La salono estis plenplena, restis nur unu loko libera, apud Marguerite Poiron. En tiu tempo la asocioj ankoraŭ ne organizis komunan manĝon, do ŝi estis sola de Cholet, mi sola de Tours. Ni decidis tagmanĝi kune. Tiam ni pli bone konatiĝis. Ŝi estis unika infano, ankaŭ mi. Ŝia patro estis lignoŝuisto, la mia ŝuriparisto, do ni planis revidi unu la alian kaj tio okazis… ĝis la geedziĝo, kio eble ne estus okazinta sen paneo de lokomotivo.

Ne planita propagando

Dum mia unua vojaĝo en Danlando, mi vizitis la belan ĉefurbon Kopenhago kun mia amiko Anders. Sur larĝa avenuo ni vidis maljunan sinjoron, lukse vestita, gestumanta kun junulino surhavanta buntan robon. Kiam ni pasis apud ili la sinjoro alparolis nin anglalingve, nek Anders nek mi komprenis, poste li parolis france. Mi demandis lin kio okazas ; li estis ĝoja trovi iun kun kiu li kapablis paroli. Li scivolis de kiu lando estas la junulino. Helpe de mia amiko mi sciis ke ŝi venis el la insuloj Feroe kaj transdonis tion al la sinjoro, kiu responde klarigis ke li estas usonano kaj ĉagrenis ke per du lingvoj : la angla kaj la franca, li ne sukcesis kompreniĝi kun tiu junulino kaj li demandis min : Ĉu vi parolas dane ? Tute ne mi respondis , sed mi parolas en Esperanto !!!

.....

La sekvantan jaron, en trajno, survoje al marbordo mi sidis en kupeo apud sinjorino. Dum nia babilado ŝi rakontis al mi ke ŝi estis sekretariino en prefektejo kaj malkaŝe mokis min ĉar mi iras al Britujo ne konanta la anglan lingvon. Poste ni eniris pramon ĉar tiam ne ekzistis la tunelo. Dum la marveturado mi ne ŝin revidis (kaj ne deziris ŝin revidi). Eliranta la stacidomon Viktoria en Londono mi ekvidis sinjoron kiu svingis esperantistan flagon. Mi salutis lin. Tuj li demandis min : "ĉu estas vi kiu vizitos miajn geamikojn Brownlee en Hescham ?" Mi jesis kaj petis ĉu li povos helpi min por trovi hotelĉambron. - "Vi ne loĝos en hotelo, li respondis, vi loĝos en nia hejmo. Mia edzino ĝojas akcepti vin." Surprize mi vidas alveni al ni mia kunvojaĝantino diranta : "sinjoro, mi vidas ke vi facile parolas kun la sinjoro, mi petas, ĉu vi bonvolas helpi min ĉar mi ne kapablas kompreniĝi kun la taksiŝoforo por iri al mia celo". Tion faris mia nova angla amiko, kaj veni mia vico ironii : "mi ne konas la anglan sinjorino, esperanto sufiĉas al mi !"

André Aude



André, hejme, kun Valentina Spitsina, la 20an de Novembro 2005.

Preparu artikolojn por la venontaj Turanĝiaj Lukoj kaj donu aŭ sendu ilin al la grupanoj, kiuj kuniĝas ĉiujn merkredojn, tiel ili relegos kaj korektos ilin se necesas.

Centre Culturel Esperanto Touraine
Halles de Tours
Place G. Paillhou
37000 TOURS
Tel : 02 47 44 62 12
esperanto-touraine37@wanadoo.fr